Kaj lia koro tute kuintirigas, memnante tion, kaj pripensante pri la turmenta malestimo, kiun al li ĉiuj sentas: - hejmo kaj patrujo, je paco kaj milito, en kajuto de malriĉulo, en palaco de riĉulo,

en kampo de batalo kaj eĉ en triumfo.

Du grandaj larmoj ekaperas en liaj okuloj kaj preskaŭ ekfalas sur liaj plumbviolaj vangoj, tiam, kiam, ĉirkaŭante lin, li vidas fermatan, kun palaj rebriloj, cirklon da bajonetoj.

Tiaokaze soldato ĉiam scias tion, kion li devas fari: - liveri la armojn mute, se li volas vivi, aŭ ekkrii viglan krion, ekpafi alarmon, se li preferas morti.

Tiu soldato estas brazila kaj bahjano, li havas ankoraŭ en la impresigaj retinoj tiun vastecon de flava sablejo, kie, je malmutaj horoj, estis oferbuĉitaj dek herooj de la trikolora malamika insigno!

Li ne povas ŝanceli; malgraŭ esti malŝatata kaj forlasata de ĉiuj kaj de ĉio, eĉ de hejmo, eĉ de patrujo, li ekkrias viglan krion!... ekpafas pafilon igante alarmsignon, kaj... tuj, li estas trapikata, de supre malsupren, ĉiujn flankojn, per dekoj da bajonetoj!


Sed, pafo kaj krio, sonoradante ĝis « nigra linio » igas rapide forkuri malamikojn.

Je tagiĝo de l'tago sekvanta, transportinte lian korpon al terura tranĉeo, kiam, oni lin ekenvolas en la or-verda flago, tra lia uniformo disŝirita per bajonetaj pintoj, iu ekvidas rebrilon de metaloj... Oni debotonumas lian uniformon...: la mizerulo havas sur la brusto, fiksitan al dika ĉemizo, aregon da medaloj!

La komandanto de l'« nigra linio, » tiel, kiel, je napoleonaj epizodoj, pasas sian manon sur sia brusto, kaj, elprenante emocie la plej ruĝbrilan ordenon, kiu sur ĝi ellumas, ek genufleksiĝas kaj, sur la naŭzan bruston de l'leprulo, ĝin fiksas li mem, dum paragvajaj kugloj trapasas, siblante, super iliaj kapoj.

Trad. Brazilianino

## LA REĜA ITALA UNIVERSITATO POR FREMDULOJ EN PERUGIA



Palaco Gallenga, sidejo de la Reĝa Itala Universitato por Fremduloj

La Reĝa Itala Universitato por Fremduloj estis kreata de la Itala Registaro por disvastigi plejbonan konadon de l'talujo en ĉiuj ĝiaj manifestacioj. Ĝi sidas en Perugio, ĉe tiu antikva kaj glora Ateneo, kaj estas malferma en la periodo Julio-Septembro de ĉiu jaro por fremduloj de kiu ajn nacio. Oni faras en ĝi kursojn de supera kulturado pri la Italaj Institutoj, Itala Literaturo, Historio de l'Arto, je ĉiuj siaj branĉoj, pri la Italaj kaj Etruskaj Antikvaĵoj, Geografio de l'talujo, Historio Itala, Itala Penso tra la Jarcentoj, Religio, Juro, Sciencoj, Estetiko, Historio de la Filozofio. Oni faras ankaŭ kurson de Etruskologio, kun rajto ricevi diplomon de perfektigo en tiu sciado.

Ĉiuj kursoj estas farotaj de Profesoroj de la Regaj Universitatoj kaj de aliaj superfamuloj specialistoj pri politiko, sciencoj, belartoj kaj literaturo.

En sama periodo oni faras en ĝi kursojn de Lingvo kaj Literaturo Italaj, dividitaj en du sekcioj, malsupera kaj supera: en ĉi tiu lasta oni ricevas, post ekzameno, Diplomojn de Kapableco por Instruado de Itala Lingvo en Eksterlando.

En la daŭro de la kursoj estas ankaŭ priparoladoj, koncertoj kaj ekskursoj en lokojn pro belartoj, pro naciaj kaj historiaj memoroj famaj.

La fremduloj estas akceptataj *sen prezento de titolo kiu ajn de lernado*, kaj rajtas utiligi specialajn faciligojn pri re-



stado, fervojaj vojaĝoj, vizo sur la pasportoj, senpaga eniro en la Galeriojn kaj Muzeojn de la Reĝlando.


Peruĝio estas kiel eble plej taŭga loko por sidejo de Universitato. La trankvila beleco de la pejzaĝo ĝin ĉirkaŭanta<sup>1)</sup> alvokas la spiritojn al la paco kaj meditado, dum ĝiaj monumentoj atestas pri civilizacio, kiu de la etruska epoko, tra la roma kaj la mezepoka, atingas la brilegojn de la Renesanco, kaj alportas an-

siaj trezoroj de la Pentraroj Umbra kaj Toskana, la riĉaj Bibliotekoj, prezentas satindegan materialon por studemuloj.

\*\*\*

La solena inaŭguracio de tiu Universitato, por ĉitiu jaro, okazos en la salonego de la Notarioj la 3<sup>an</sup> de julio: oratoro Lia Ekcelenca Moŝto Tommaso Tittoni, Prezidanto de l' Senato.

La kursoj de la Supera Kulturo kon-



Sidejo de la Kambistoj

kaŭ nuntempe sian kontribuon al la re-florado de la itala vivo.

La glora Universitato, kies unuaj memorajoj revenas ĝis la XIII jarcento, la Akademio de Belaj Artoj, la Muzika Instituto, la Reĝa Supera Lernejo de Agromonio, la Reĝa Supera Instituto de Veterinaro, montras kiel en Peruĝio ĉiu manifestado de alta kulturo estas supersatata. La Muzeoj Prahistoria, Etruska, Roma, Mezepoka, la Reĝa Pinakoteko, per

1) En ĝi la glora poeto Carducci [Karduĉi] verkis sian belegan *Kanto de la amo*.  
Rim. de la tradukinto

cernos precipe la XV Jarcenton. Dum tiu Kurso la Kondukanto de Italio, Benito Mussolini, favoronos ankaŭ en ĉitiu jaro la honoron de unu sia leciono.<sup>1)</sup>

Unu el la famaj eminentuloj, kiu instruos en ĉitiu kurso, estas Guglielmo Marconi [Guljelmo Markoni], kaj aliaj: Lia Ekcelenco Pietro Fedele, Ministro de la Publika Instruado, kaj Enrico [Enriko] Ferri.

1) Post ne multe aperos esperanten tra dukita la prelego de Li farita la pasintan jaron: *L'Antikva Romo surmare* (v. apartan anoncon)

\*\*

Por esti enskribitaj en la Speciala Kurso de Etruskologio kaj Klasikaj Antikvavaĵoj oni devas prezenti ateston de la faritaj studadoj ne pli malfrue ol la 20<sup>an</sup> de Junio 1927. Post ekzameno, ĉe la fino de ĉitiu Kurso estos liverata *Diplomo de perfektigo en la studado de Etruskologio*.

La specialaj taksoj por tiu kurso estas:


Por unu monato . . . . . L. 200  
Aldona takso por la inskribitoj al la kursoj de Lingvo . . . . . 50

Por apartaj kursoj kaj Paroladoj la taksoj ne estas ankoraŭ fiksitaj.

Por la kursoj de Lingvo kaj Literaturo Italaj:

Malsupera kurso:

Por la tuta kurso . . . . . L. 200  
Por unu monato . . . . . 100  
Por du monatoj . . . . . 150



Peruĝio — Etruska arko

Enskribo kaj ĉeestrajto . . . . . L. 200  
Ekzameno . . . . . 50  
Diplomo . . . . . 75

Por ĉeesti la aliajn kursojn *nenian diplomon oni postulas de la fremduloj*, escepte por tiuj, kiuj sin prezentos al la ekzameno por ricevi la Diplomon de Kapableco je la Instruo de Itala Lingvo: ĉituij devos prezenti ateston de faritaj lernadoj, pri kies taŭgeco juĝos la Komisiono.

Por la kursoj de Supera Lernado (escepte farita por la Etruskologia) la taksoj estas jenaj:

Por ĉiuj kursoj dum la monatoj de malfermo de la Universitato . . . . . L. 200

Supera kurso:

Por la tuta kurso . . . . . L. 300  
Por unu monato . . . . . 150  
Por du monatoj . . . . . 250

Estas liberigitaj de tiuj taksoj la civitanoj de la Italaj Landoj Reakiritaj (Terre Italiane Redente).

Takso de ekzameno:

Por la scio de la Lingvo . . . . . L. 20  
Por la diplomo de rajtigo al Instruado de Itala Lingvo . . . . . 60

Takso de diplomo:

Por scio de la Lingvo . . . . . 50  
Por la rajtigo al instruado de Itala Lingvo . . . . . 75

Atesto de ĉeesto . . . . . 25





Perugio — Publika Palaco

\*\*

Al Italaj kaj fremdaj studentoj, kiuj diligente ĉeestis la kursojn de Supera Kultarado oni liveros *Ateston de ĉeesto*.

La fremduloj ĉeestintaj la lecionojn de unua Kurso de Lingvo kaj Literaturo Italaj, kaj sukcesis en la ekzameno, ricevos la *Ateston de Scio de la Itala Lingvo*.

La fremduloj, kiuj ĉeestis la lecionojn de la Supera Kurso de Lingvo kaj Literaturo Italaj, sukcesinte en la ekzameno, ricevos la *Diplomon por Instruado de Itala Lingvo en Fremdlando*.

\*\*

Por pluaj klarigoj koncernantaj ĉu la

nomojn de la geprofesoroj, ĉu la programojn kaj la temojn de la lecionoj kaj paroladoj, la fervojajn reduktprezojn, la eniron en la galeriojn, muzeojn, bibliotekojn, la monumentojn de la Urbo, la ekskursojn, la faciligon de la loĝado kaj vivado, la sendon de klarigaj broŝuroj, presitaj ĝis nun en la lingvoj *germana, angla, franca kaj itala*, oni estas petata sin turni al la Komandoro Advokato *Astorre Lupattelli*, Prezidanto kaj Rektoro de la Universitato, aŭ al *S-ro Nazareno Boccioni*, Unua Arkivisto de la Tribunalo, Delegito de U. E. A., *Perugia (Italujo)*.

Trad. A. Mazzolini

## Al la Esperantista Tutmonda Gazetaro

PETO MENCII PRI ĈI-TIU ARTIKOLO

*Antaŭajn, korajn dankojn esprimas al la gazetoj, kiuj bonakceptos tiun peton, la*

R. ITALA UNIVERSITATO POR FREMDULOJ

# LA KVIN TEROJ

ITALA GENTO KAJ LANDO

Kvin teroj! Ŝtonegoj pendantaj sur la maro, vilaĝoj alkröcitataj al la roko, kvazaŭ plitentaklaj polipoj, aŭ preskaŭ kaŝitaj en malgrandaj valetoj, inter la monto abrupta, laŭŝajne falanta por ilin engluti, kaj la maro, kiu dum siaj ŝtormaj trapegoj ŝajnas ke ĝi volas ilin elradikigi! La tuta sovaĝa krudeco de la *Riviera di Levante* (orienta marbordo) mirinde kolektita inter malmulta lando kaj malmulta maro.

Pest Levanto, koketema kaj frizita, iom pretendema per sia Kazino, per sia urboŝajno, kun sia malgranda lido, elmontrejo de artefarita kosmopolita belularo; post Mesco [elp. Mesko] elstaranta kaskado da rokoj sur la maron, riĉa je pintoj, piramidetoj, saltajoj, tra ĝoja blekado de falketoj, la marbordo jam sunbruligita, iĝas des pli ardita, pli kruda, pli sovaĝa, kaj ĝis Cavo [Kavo] ĝis la insulo Palmaria [Palmarja] kaj la rifego Tino estas plena disrokado de montoj en maron fundan kaj lumoplenan, estas sinsekvo de sovaĝaj belajoj, kiujn monto kaj maro renovigas ĉiumomente, senĉese.

El Semaforo de Mesko, sur blanka teraso, laŭŝajna ferdeko de ŝipo veliranta en lazura ĉielo, antaŭ miranta okulo, ĉiuj envicigas laŭ neregula arkajo la tiel nomitaj *Kvin-Teroj*; kaj lipo flustre ripetas al ni mem nomon, por ĉiam signontan kaj elvokontan en nia memoro songan vizion, kiun ni volus kunporti.

Monterosso, revema kaj ridanta sur siaj du marbordoj, inter kiuj sur maldika roksprono elrigardas blankega monaĥejo de kapucenoj, kaj supre inter pinaj pintoj, roza palpebro amindumanta la sunon,

Madono de Soviore, jam de longe rigardas amplekse, ĝis malproksima horizonto, ĝis insuloj Capraja [Kapraja] kaj Korsiko, per sia vigla patrino rigardo.

Vernazza [Vernaca] mizere alradikita al la roko, ĉirkaŭ sia kastelo en preskaŭ homa miksaĵo da korpoj sin malespere alkröcantaj por sin savi el mara kolero.

Kaj alte, laŭ grade malaltiganta per terasoj de belegaj vinberejoj Corniglia (Kornilja) riĉe sidanta sur mallarga plataĵo, ĝuanta sunon kaj lazuron; malantaŭe, duonkaŝita tra pintoplena ŝtoneguro, kvazaŭ ŝipo tutpreta por enmarigo, Manarola.

Malsupre Riomaggiore [Riomagore] malordigo de mizeraj domoj, laŭŝajne grim pantaj unu sur alian por formi fortikan remparon se el la maro venos ankoraŭ, por forrabi virinojn kaj monon, la Saraĉenoj.

Duonsupre, sur la montodorso, la blanka Sanktejo de Montenero, serene gardanta, kiel same ĉiuj Sanktejoj de la kvin Teroj, sur la maron, la destinojn de ŝipveturantoj kaj fiŝkaptistoj. Simboloj de sentita kaj pura kredo, la kvin Sanktejoj starigitaj sur la montaro de la Kvin Teroj, estas kvazaŭ ideala lumo de ĉi-tiu lando: lumoj kiujn maristoj ekvidas brilantaj tra nebulnigro de ŝtormanta oceano por vivigi esperon en siaj koroj.

Malproksime, kie kvazaŭ malkovrita, kisas maron Pinto St. Petro ĉe Portovenere, Palmarjo kaj Tino, aperas ĉarmo de l' luna golfo de la poetoj. Rifoj, maro kaj suno! Orgio de lumo kaj de koloroj. Maro bela kiel ĉiam kaj ĉie, sed se eble pli ensorĉa, pli ekblindiga pro la sovaĝa



krudeco de la scenejo ĝin enfermanta. La rifaroj gigantaj, duonnigraj, disrompitaj ĝin strekas per variega ludo de lumoj, de ombroj, de duonlumajoj kie la koloroj alprenas tonojn nepenseblajn kaj ŝangantajn de momento al momento. Dum markvieteco la verdeto kristala kaj vapora de la sablaj bordpecetoj, kie la boatoj alankritaj aperas kvazaŭ strangaj flugmaŝinoj, swebantaj en la aero, kaj kviete balancigantaj sian facilmovan ombbron: la malakita verdo, la duongrizo kie speguligas la minacantaj rifaroj, la kobalta lazuro, la duonbluo, la dubenigro en marpecoj iom malproksimaj de la bordo, kunfandigas laŭ vivoplena kolorgamo de la plej mildaj nuancoj al tonoj plej intensaj.

Ĝi iĝas nerekonebla kiam libeĉo (suda vento) ĝin ŝveligas, ĝin incitas, ĝin puŝegas sur la rifaroj, ĝis hieraŭ lulitaj en idilia sereneco, laŭ infera tregendo plena je fajfoj, krioj, ploroj, blekoj, resonoj, knaroj, krakoj kaj spumŝprucado, sed ĉiam bela, eĉ pli bela dum ĝia teruriga sovaĝeco.

Sur la rokaro ardita, ŝtonplena, falema, nur taŭga por naski plektoplantojn, sovaĝajn pinojn, rubuson kaj mirtelon, la loganto de la Kvin Teroj portis, laŭ proverba persistemo de la Ligurianoj, la vinberplanton, kaj sur laŭŝtupare platajetoj skrapitaj en viva ŝtono rekte malsuprenigantaj al la maro, ridas ĉe la suno la beraro de l' malalta vinplanto, inter argento de olivarboj kaj kupra verdo de pinoj. Tie naskiĝas la blonda, seka, alĥoola vino de la Kvin Teroj, ŝajne enfermanta en sia bongusta profumo iom da salo de l' maro kaj aromo de l' pino. Tie, el sama vinbero, duonsekgita ĉe tiu varmega suno sur hejmaj tegmentoj naskiĝas la ambra nektara « Ŝaketra' o ».

Estas vinoj, jam konintaj luksegon de regaj kaj princaj festenoj, kiuj nun, nur

en liguria lando trovas entuziamajn kaj piajn adorantojn, vinoj ankoraŭ indaj je aristokrata kunmangantaro kaj je kanto de poetoj, kaj kiujn ofte, dum restado en La Spezia, Luizo Bonati « amiko de poetoj », verŝis al Karduĉi, al Paskoli, al Severeno Ferrari.

Krudaj, netoleremaj, preskaŭ sovaĝaj, kiel generale estas la Ligurianoj, sed je krudeco kaj netoleremo devenanta el la sovaĝa krudeco de ilia naskiĝa lando, la logantoj de la Kvin Teroj povas simili anakronismajn restaĵojn de aliaj epokoj, meze de nia mekanika kaj industria civilizo. Sed tio ne estas, ili estas homoj alkutimigintaj al daŭra batalado kontraŭ la elementoj, kontraŭ la grundo al ili refuzita peceto post peceto pro ĝia granita firmeco, kaj kiun ili, peceto post peceto, kun persista pacienco per braka, pikila forto superregis. Sufiĉas vidi la mirindajn vinberejojn grimphantajn preskaŭ de la marnivelo al la kruta montodorso, sufiĉas vidi la angulajn ŝtonmuretojn surtenantajn la bedojn, sufiĉas vidi tion kion fruktodonas laŭlitera pugno da grundo en mano al ĉi-tiuj homoj, por kompreni ilian silentan seriozemon kaj por ilin ami. Estas homoj lernintaj la silenteman paciencon el longa alkutimiĝo kun la maro, konantaj la tute lacigan maltrankvilon de l' vana fiŝoserĉado dum longaj noktoj kaj tagoj; kiuj kapablas fideme atendi la « preterpason » de la anĉovoj, kiuj tamen povas ne preterpasi; kiuj konas atendon eĉ meze de ŝtorma marmoviĝo pri serena markvieteco: bone spertintaj krudecon de sia vivo, kaj dum silento, ilia fermentilo kaj salo, ekincitantaj kaj streĉantaj ĉiam pli sian volon, jam tiel forte streĉitan.

Estas homoj, kiujn grunda malriĉeco puŝas al marmigrado, antaŭ ne longe sur velŝipoj veturantaj al Pensakola por al-

porti vinon kaj enŝargi lignaron kaj kiuj plene gardis sian persistemon dum la laŭ romanaj aventuroj de jamaj velveturadoj daŭrantaj monatojn kaj monatojn, kaj nun vi ilin trovos silentemaj kaj serenaj sur ĉiuj porŝargaj kaj transatlantikaj ŝipoj de Italio. Estas la homoj, kiuj forlasinte la ŝipojn kaj sin aventurinte Amerikon, ĉiam per sia sola, kvieta, neelĉerpebla persistemo tra penegoj kaj rezignoj malfacile imageblaj, post elŝarita monriĉaĵo, instinkte revenas al la lando, al la rifoj senfruktaj kaj sunbruligitaj, kie ili naskiĝis kaj tie ili malŝparas monon kaj monon pro publikaj laboroj kaj bonfarado. Estas le gento vere enfermanta en sia obstina persistemo ĉiuj dotojn de...

..... granda gento hardita  
sperta je mil vojoj kiel odiseo,  
mil ruzojn scianta, alkutimita  
al malfeliĉo, kontraŭ riskoj preta  
.....  
ne venkebla ĉe danĝero aŭ utilo.

Fermitajn inter monto kaj maro, fluge preterpasitajn tra fantasma sinsekvo da tuneloj, de la rapidaj vagonaroj, tra densa mallumo kaj lazuraj sagoj, ne vin konas, ho! Kvin Teroj, la vojaĝantoj de la internaciaj dormvagonoj; ili plej eble vin memoros kiel lastan kaj tedan aferon de la kruta Ligurio. Iu, eble foliumante la horlibron trovos nomojn, nurajn kaj nudajn nomojn: Monterosso, Vernazza Corniglia... Kaj en lia memoro tiuj nomoj asociiĝos al terure sinsekvantaj tuneloj serpentumantaj viajn rifarojn.

Des pli bone; pli bone estas ke ili ne sciu la sunan luksegon kiu tiujn mizerajn nomojn enfermas, plibone ke ili ne konu la Dian lazurecon de l' maro kaj de l' ĉielo kolektiĝanta en via sovaĝplena intermontaro.

Tiel, oni ne vin makulos mastodontaj skribajoj kaj skatolegoj el armita betono

de la luksaj hoteloj kaj gastejoj, kaj la puran, silentan serenecon de viaj maraj placetoj ne abomene strekos bruplenaj, sekaj ridoj de la invademaj transoceanaj komitivoj, tiel la tradiciaj sportulinoj kun najlitaj piedvestoj, kun tradicia Baedeker en mano kaj rigardo okukita ĉe karakteriza esprimo de feliĉa mirego ne alportos falsan tonon en la harmonio de via sovaĝa beleco.

Vi restos do ĉiam egalaj al vi mem; virgaj en via pura beleco, silentaj kaj gajaj, fervoraj kaj sovaĝaj kiel vin pentris Telemako Signorini en siaj dezegnoj tiel vivoplenaj kaj sugestiaj: Antono Discovolo en la ampleksaj, lumaj, aeraj toloj, Ektoro Gozzani, nia poeto, en la lirika belsoneco de siaj helaj prozaĵoj.

Lastaj oazoj de silento kaj paco, lastaj rifugejoj de nemakulita beleco por revoj de poetoj kaj enamigintoj de nia maljuna Ligurio.

El Caffaro

M. Arabeno

## LA ĜENANTO


Iu sinjoro iris je ĉiuj horoj viziti eminentulon: se la mastro ne estis hejme, li petis vidi la mastrinon: se li ne povis vidi ŝin, li diris ke li iros en la ĝardenon promeni kun la infanoj; se tiuj ĉi forestis, ke li amuziĝos paroli kun la papago; se la papago estis fermita en iu ĉambro, ke li atentos la revenon de la gemastroj kaj ke dume li streĉos la grandan pendolhorĝon.

Iumatene la servisto, troviĝante apud la fenestro, vidis nian sinjoron kiu iris tute rekte al la palaco; li malsupreniris la ŝtuparon, kaj en la sama momento en kiu la alia frapis la pordon, malfermis kaj diris kvazaŭ dirante « bonan tagon »:

— La mastro foriris, la mastrino malsanas, iliaj gefiloj estas en la lernejo, la papago mortis, la horloĝo estas rompita. Miajn komplimentojn — kaj li fermis la pordon kontraŭ la vizaĝo de la ĝenanto.

Trad. M. Filippi





EKKHOUD GEORGES, **Servokapbla!** - Marcus Tybout - Internacia Mondliteraturo n. 20. - Leipzig, F. Hirt kaj filo. Pp. 71, M. 1.60.

La firmo Hirt daŭrigas sian kolekton «Internacia Mondliteraturo» per traduko el flandra lingvo de du noveloj de Georges Eekhoud. En ili la aŭtoro sin prezentas al ni ne kiel belgo, kiu priskribas karakterizajn kostumojn aŭ pejzaĝojn de sia lando, sed kiel homo protektanta la malfortunon, la malaltrangulon, homo kiu elektas la defendon de la premato kontraŭ la premanto, de la suferanto kontraŭ la suferiganto.

En «Servokapbla» (pp. 11-48) li akompanas en la kazerna vivo viglan belgan laboriston priskribante la malĝojojn, erarojn, laborojn, punojn, ĉiam celante lin simpatiigi al ni. Kaj bone li sukcesas: kiam je la fino de la militista servo la soldato jam foriranta frapas pro eksciteco serĝenton kaj tial estas ankoraŭ retenita, ni preskaŭ ploras kun la atendantaj patrino kaj amatino pro lia malbona sorto.

Ankaŭ en la alia rakonto «Markus Tybout» la perforto estas kondamnita. Teras en ĝi pri junulo obstinega ĉasanto de virinoj; kun ĉiuj li ŝercas sed fine post intrigoj kun filino de bienulo li estas devigata edziĝi kun ŝi: ĉar li rifuzas, li estas mortigata de la tri fratoj de la rifuzita fraŭlino. Precipe rimarkindaj estas la lastaj paĝoj priskribantaj la lastan diskuton inter la patro de la ino kaj la eksamanto.

Vere bonega estas la traduko de Jean Ber gier: la lingvo estas samtempe belsona kaj pura.  
e. m.

KARINTHY F., **Norda Vento.** El la hungara lingvo tradukis K. Bobó. Biblioteko Tutmonda n. 7-8. Berlino, R. Mosse, 1927. pp. 95.

Kolekto de noveloj strangaj, originalaj, ofte kapricaj sed plenaj de lirika ardo. La noveloj frapas nin per io freŝe nova, per nekutima lumigo de nekonataj flankoj kaj per konstanta alterno de grotesko kaj filozofia tragi-

ko ekscitas kaj emocias, kvazaŭ ekveko el rida masko.

Oftaj la neologismoj (amara, aŭdaca, blufi, farbo, fetoro, inkubo, jaluzio, peono, tempesto) plejparte akceptindaj.  
e. m.

KÖROLENKO V., **La sonĝo de Makaro.** El la rusa lingvo tradukis M. ŠIDLOVSKAJA. Biblioteko Tutmonda n. 9. Berlino, R. Mosse, 1927, pp. 48.

Makaro, malriĉa paŝtisto de la Jakuta Tajga, post la morto estas akompanata de pastro, kiu dumvoje al li klarigas multajn misterojn, al la suprema juĝo: tie li vidas peziltelerojn kiuj moviĝas laŭ la rakonto de propraj agoj. La koloro de la Tajga konstante ĉeestas en la rakonto kaj ankaŭ la animo de la aŭtoro firme kredanta ke ĉiu homa animo havas en si «dian fajron».  
e. m.

## ITALA KRONIKO

Trieste. La 4-an aprilo nia grupo ŝanĝis sian sidejon kaj translokiĝis en Via della Gimnastica N. 18, unua etaĝo. La kunvenoj okazas ĉiam lunde kaj ĵaŭde de la 20 ĝis 22 horoj.

Okaze de la inaŭguro de la nova sidejo, D-ro Ghez faris, antaŭ multenombra publiko, belan paroladon pri la enkonduko de Esperanto en nian urben, rememorante la ĉefajn okazintaĵojn de nia grupo, nian batalojn kaj niajn venkojn. D-ro Ghez finis sian paroladon bondezirante al nia grupo en la nova sidejo feliĉan kaj sukcesplenan estontan agadon. Pri la bela festo la grava ĵurnalo *Il Piccolo* faris longam raporton.

Pro malagrabra okazintaĵo dum la lasta ordinara jarkunveno, la estraro de nia grupo ekŝiĝis. Dum la eksterordinara kunveno, kiu okazis en la malnova sidejo, la 24-an marto estis elektita la jena nova estraro: Prezidanto Kav. D-ro Arturo Ghez; Viceprezidanto Prof. Carlo Simonis; Sekretario Doc. Vittorio de Nardo; Kasisto Rag. Antonio Ratisša; direktoroj S-roj Antonio Cosmaz, Doc. Giacomo Rose kaj Marš. Colombo Verdi.

NEKROLOGIO - En Sampierdarena mortis S-ino Magnasco Maria, amata edzino de nia Samideano S-ro Amedeo Redolfi.

Al li kaj gefiloj plej korajn kondolencojn.

Tipografia Editrice A. Paolet, S. Vito al Tagliamento  
A. Paolet, dir.-resp.

## Oficiala Klasika Libro

Edizione ITALIANA, SPAGNOLA, PORTOGHESE

compilato dall'Accademia Esperantista

Prezzo L. 3.60

Presso la nostra Rivista

## Fundamenta Krestomatio

de L. L. ZAMENHOF — L. 13.—

## Vortaro de Esperanto

de KABE — L. 12.—

Presso la nostra Rivista

## UN GIORNALINO PREZIOSO

al quale tutti i padri di famiglia dovrebbero abbonare i loro figlioli è



## "LO SCOLARO"

settimanale illustrato in 16 pagine appositamente scritte per i piccoli studenti.

Un'annata de «LO SCOLARO» forma un volume di 700 pagine con più di 1000 illustrazioni.

L'abbonamento annuo costa L. 12.80.

LO SCOLARO si trova in vendita presso le edicole. Se ne può avere una copia gratis rivolgendosi all'Amministrazione del Giornale: S. Matteo, 12 - GENOVA.

Se vi deziras ricevi SENPAGAJN specimenojn de la plej aktuala, ĉiusemajna Esperanto-ĵurnalo

## HEROLDO DE ESPERANTO

aŭ de la plej malkara, monata Esperanto-gazeto

## VERDA STELO

kune kun nia plej nova LIBRO-KATALOGO, skribu tuj al la Administracio de

Heroldo de Esperanto, Herrem b. Köln

Germanujo.

Bonstila, belilustrita, riĉaspekta kaj diversenhava estas la sola teknika gazeto

## Internacia Radio-Revuo

Organo de la Internacia Radio-Asocio.

KONSTANTAJ FAKOJ

Mi konstruas — Paŝo post Paŝo (originale popularigata teorio de Rádio) — Radiohumoro — Internacia Radio-Vivo — Tra la Radio-Gazetaro — Esperanto por Radio, Radio per Esperanto — Internacia Radio-Asocio k. a...

PREMIO POR ĈIUJ ABONANTOJ;

KOLORTABELO DE 99 SKEMOJ

Konkurso kun multnombraj premioj

(i.a. kompleta radio-ricevilo, lutilaro kaj multaj radiaĵoj)

Abonprezo (p. 12 N-oj): UNU DOLARO aŭ egalval. en naŭla mono

Petu de la eldonejo la tabelon de FAVORAJ PREZOJ,

de naciaj AGENTEJOJ kaj la kondiĉojn de KONKURSO

POR ITALUJO: FAVORPREZO 19 LIROJ

Reprezent. : S-ro G. Saggioli, Corso Vittorio Em. II., 6. Padova.

Ĉefredaktoro: D-ro Pierre Corret

Redaktoro: Inĝ. E. Aisberg.

ELDONLUGO: ETIENNE CHIRON, 40, RUE DE SEINE, PARIS-VI



EN PREPARO

BENITO MUSSOLINI

# LA ANTIKVA ROMO SURMARE

PRELEGO FARITA LA 15<sup>da</sup> DE OKTOBRO 1926  
EN LA SALONO DE LA NOTARIOJ, PERUGIA  
AL LA GESTUDENTOJ DE LA  
" REGIA UNIVERSITÀ ITALIANA PER STRANIERI "   
(Itala Universitato por Fremduloj)

En kompostado :

## Komerca Vortaro en Esperanto

DE

R. Kreuz kaj A. Mazzolini

Membroj de Lingva Komitato

Aranĝita laŭ metodo de Kabe — Proksimume 120 paĝoj poŝformato

Prezo It. L. 12 bindite

Antaŭmendantoj ĝis la 31 Majo ĝuas rabaton de 10 % — Mendu tuj !

ELDONANTO A. PAOLET - S. VITO AL TAGLIAMENTO (ITALIO)